Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.), Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista (T. E. L. F.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2ª jaro. No. 1 **Monata** **Januaro 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1ª de l'monato
Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj kaj Germanoj 30.000 aŭ. K, Alilandanoj 3.50 svis. fr.

DEKDUO DA VIROJ FORŜOVIS FERPONTON.

Originala artikolo por „A. E." de *Walter Smital*, Wien.

La teknikajn datojn afable disponigis la ĉefinĝeniero *Leopold Hannes* de la konata pontkonstrua entrepreno *Waagner-Biro A.-G.*, Wien-Graz.

Represo en naciaj gazetoj dezirata.

La 17. decembro 1924 antaŭtagmeze oni translokigis en Wien tutan ferponton 720 t[1]) pezan je distanco da 20 m.

Temas pri Brigittabrücke (t. e. Brigitta-ponto), kiu transigas tre gravan interkomunikiĝvojon inter la Donaŭnajbaraj (nordorientaj) kaj la okcidentaj urbdistriktoj trans Donaŭkanal kaj tiel interligas ankaŭ tri gravajn fervojstaciojn de la urbego.

La fera portilaro (konstruita en 1871) sin prezentas trapezforma fertrabaĵo je 67 m apogdistanco, konsistanta el du ĉefaj portvandoj kun veturejporta riparo, sur kiu kuŝas ligna veturejtavolo kun lignokuba pavimo, 10·5 m larĝa. Ambaŭflanke estas fiksitaj po unu 3·80 m larĝa irejo. La ponto povis porti proks. 600 t entute, plej pezan unuopan veturilon da 12 t.[2]) Ĉiama zorgigaĵo iĝis la ponto depost la ĝenerala funkciigo de l' elektra tramvojo kaj la konstanta plipeziĝo de la strataj ŝarĝveturiloj. Krome oni devis ĝin ofte ripari, ĉar la materialo estas veldfero.[3])

Fine la komunumo Wien decidis la konstruon de nova ponto kaj rondedemandis pri ofertoj en „Zeitschrift des österr. Ingenieur- u. Architektenvereines", Jahrgang 1924, S. 353 (t. e. „Organo de Aŭstria Inĝenier-kaj Arkitekt-Unuiĝo", jarkolekto 1924, pĝ 353). Naŭ tre interesaj projektoj pri ferpontoj kaj kvin pri ferbetonaj estis la rezulto; projekto de la firmo Waagner-Biro A.-G. estis akceptata. Laŭ la sistemo ĝi estas unueca trabo super longa mezaperturo kaj du mallongaj flankaj aperturoj kun artikoj proksimume en la kvaronpunktoj de la meza.

Por plej ekonomie solvi la problemon de provizoraĵo dum la novkonstruo, oni decidis forŝovi la ĝisnunan portaĵon 20 m kontraŭfluen de ĝia antaŭa loko.

Kvankam la transportado de tiom grandaj amasoj estas teknike simpla, tia laboro tamen restas dependa de malicaj cirkonstancoj; des pli ĉi okaze, ĉar la kaja grundo, alŝutita akvotralasa, estas ne fidinda.

Senpacience la logantaro atendis la efektivigon de tiu sensacia laboro, kiu ja ankaŭ estis ŝanĝonta la kutiman stratbildon.

---

[1]) 1 tuno = 1000 kg.

[2]) Sur la aliaj (pli novaj) kanalpontoj: 28 t, respektive 38 t.

[3]) Germane: Schweisseisen.

Unue oni kelkajn metrojn laŭflue de la ponto starigis provizoran kablo-portponteton kaj transmetis tien la telegraf- kaj telefonkablojn de la poŝto kaj la kondukilojn de la elektrofarejo.

La 8. oktobro komencis la laboroj por la forŝova trabaro. Sur ambaŭ bordoj estis palisegoj elektre enbatataj en tri vicoj paralele al la kanalo, metata sur ilin premegaliga pezondisiga intertavolo,[4]) sub kiu malleviĝoj devis esti tiom bagatelaj, ke lokaj kurbiĝoj de la ŝovreloj, pro plieniĝo de paliso dum la ŝovado, ne povis okazi.

La ŝovejo mem konsistis el najbarsintuŝaj kverkaj fervojsubrelaĵoj kun ŝtalreloj (profilo A de Aŭstria Fervojaro), 140 mm altaj. La reloj estis instalitaj 5‰ deklive por egaligi eventualan de la palisoj malleviĝon. Por minimumigi tiun, antaŭe okazis provoj (en Teknika Akademio-Wien kaj en la pontkonstruejo Waagner-Biro A.-G.) pri la enpremiĝo je la uzota lignomaterialo rektangule je la fibroj; konstato: per 30 kg/cm²: 10 mm. Laŭ tio oni ne pivotligis[5]) la palisojn, sed metis sur la palisokapojn 7 mm dikajn ferladojn. Efektive la lignopremiĝo estis nur dumilimetra (la palisoj cedis je 0·8 mm kaj kurbiĝo de la ladotraboj mem — senapoge portantaj je distancoj da 5 m — entute ne estis konstatebla).

Sur la ŝovejo 8 veturiloj kun po 4 rulaĵoj atendis la pontŝarĝon. Po du estis interligitaj per balancilo, kiu servis por kaŭzi egalpremon sur ĉiujn rulaĵojn. Tiu premo do estis 720 t (pontpezo) : 32 (rulaĵoj) = 22·5 t (sur unu). Kalkulado pri la aksfroto kaj la rulvetura rezisto rezultigis, ke oni bezonos tirforton da 23 kg por ĉiu tuno de l' ŝarĝo, do 720 × 23 kg = 16.560 kg. Tiun forton liveris ambaŭborde po unu trituna vinĉo[6]) kombine kun sesobla takelo[7]): 6 × 3 t = 18 t.

Intertempe laŭ la nova pontakso estis preparitaj interligaĵpartoj inter la provizoraj murlagroj[8]) kaj la bordoj, kaj ankaŭ plifortigita la tegtavolo super la laŭkanala linio de l' urba subtera fervojo

La 12. decembro nokte la ponto estis levata[9]) kelkajn centimetrojn kaj remetata sur lignoŝtiparon 80 cm larĝan, je kies ambaŭ flankoj estis instalitaj la ŝovreloj je 1 m interreldistanco. Oni elprenis la lagrojn kaj adaptis ilin en la fabriko por ilia nova loko.

En la nokto inter la 16. kaj 17. decembro oni ĉesigis la transpontan frekventon, interrompis la elektrokondukilojn de la tramvojo, disigis la pontan veturejon de la strato. Poste la ponto estis levata je 40 cm, la pretaj veturiloj kuplataj kaj subŝovataj. Matene la 17. decembro la remallevita ponto atendis sian migradon.

Post laborpaŭzo la forŝovado komencis ½9a kaj post du horoj estis finita.

La transmisia rilato[10]) de l' vinĉoj estis 1:86, do la tuta (konsiderante la sesoblan takelon): 6 × 86 = 516. Ĉar oni bezonis tirforton da 16.560 kg, estis do necesaj 16.560 kg : 516 = 33 kg je ambaŭ vinĉoj, do 33 kg : 2 = 16·5 kg je unu moviga ŝafto.[11]) Tiu ĉi forto estis facile liverebla de ses viroj ĉe ĉiu vinĉo. La observita rapideco de la movo estis 1 m dum 6 minutoj.

Por eviti oblikvinterpremiĝon de la ponto la ŝovrelaro estis zorgege mezurkontrolata: Je longo da proks. 35 m oni konstatis inter la ŝovrelparoj (67 m distancaj unu de la alia) neĝustecon da 2 mm de preciza paraleleco. — Por ke la vinĉoj sur ambaŭ bordoj laboru konforme, laŭlonge la reloj estis aranĝataj po unu skalo, kiujn preterglitis po unu montrilo fiksita sur la ponto. El de kancelo instalita sur la pontmezo la de l' montriloj indikataj skalpunktoj

[4]) Konsistanta el tri ladotraboj (1400 mm altaj) kun rektangulaj randaj flankalaĵoj.
[5]) Germane: verzapfen.
[6]) Germane: (Trommel-)Winde.
[7]) Germane: Flaschenzug.
[8]) Germane: Mauerlager, Maueraufflage, Widerlager.
[9]) Por la levado oni disponis kvar hidraŭlajn glicerinoleo-premilojn je po 300 t leviforto.
[10]) Germane: Übersetzungsverhältnis.
[11]) Germane: Antriebwelle.

estis montrataj ambaŭflanken per granda duobla ciferplato.

Post la alveno de la ponto sur la destinita loko la pontakso estis kontrolata, la tirŝnuregoj malstreĉataj, la tramvojreloj kunigataj, la pavimo almetata sur la mallongaj interligpartoj surbordaj kaj la elektrokondukiloj por la tramvojo alligataj.

La 19. decembro matene la ponto estis post antaŭa ŝarĝprovo ree dismontata por la frekvento tutampleksa.

La tutan senmalhelpe okazintan procedon efektivigis la pontkonstrufirmo Waagner-Biro A.-G., Wien-Graz, sub gvidado de la konstruoficejo de Urbo Wien (pontfako: d-ro inĝ. Musil).

NOTO. Ĉiokaze la atento de ĉiu serioza esperantisto estu direktata al Eugen Wüster, Maŝinfaka Esperanto-vortaro prielementa (eldonejo F. Hirth & Sohn en Leipzig, 1923, Esperanto-fako), kiu tre faciligis la laboron al la verkinto.

KARA LEGANTARO!

Kiu kelkajn jarojn observis la Esperanto-movadon en Aŭstrio, scias, kiel eksplode ĝi pliampleksiĝis en la tempo antaŭkongresa.

Se jam en pasintaj jaroj interliganta raportorgano estis bezona, depost la kongreso ĝi estas nepra necesaĵo. Neniu inter la konstante por Esperanto laborantoj neos tion.

Ne estis la rezulto de gazetfonda febro aŭ de persona famiĝemo, ke samideano Steiner en tiu kriza tempo eldonis „A. E.“. Oni devus pli precize diri: li riskis eldoni ĝin. Kiom ofte nia samideanaro jam ĝoje salutis novan aŭstrian gazeton! Sed, kiam oni pagu...!

Mi ne volas timigi vin. Vi ne pagu pli multe ol vi pagis ĝis nun. Sed: ĉu ĉiu Esperantisto konata al vi persone estas jam abonanto de „A. E.“? — ĉu ĉiuj viaj gelernantoj? Jen la solvo! Bonvolu do helpi la pluan ekzistadon kaj perfektiĝon de nia organo per abonigo. Almenaŭ adresojn de interesigotaj personoj sendu ĉiu el vi! La redakcio tuj alsendos al tiuj personoj provnumerojn tiel subtenante ankaŭ vian propagandlaboron.

Precipe varbu anoncojn! Anonci en internacia gazeto, kiu eniras pli ol dudek landojn, signifas ja ankaŭ por la koncerna firmo ne nur Esperanto-subtenon. Jen, Esperanto-akcela financa helpo — ne el via poŝo!

Ĉiu liveru iel parteton da laboro por fine garantii al Aŭstrio valoran Esperanto-organon. *Walter Smital.*

LA AŬSTRIA MINISTERIO POR INSTRUAFEROJ KAJ ESPERANTO.

La centra direktoro de la liglandaj edukinstitutoj sendis al ni jenan de ni esperantigitan leteron, respondante al dankletero de A. E. D.-konferenco en Graz (komp. protokolon en n-ro 5, 1924) pro lia ĝisnuna favorado de E. en liglernejo Traiskirchen (komp. artikolon en n-ro 4, 1924), kie s-ano Steiner gvidas du kursojn kun 70 lernantoj.

Liglanda ministerio por instruado
Centra direkcio de la liglandaj edukinstitutoj
Wien I, Minoritenplatz 5.

Nr. 6462/B E A.

Wien, la 16. dec. 1924.

Al s-ro H. Steiner
en Bisamberg apud Wien.

Pro la afabla alskribaĵo d d. 7. dec. 1924 mi havas la honoron diri al vi plej koran dankon. Kie kaj kiam la cirkonstancoj tion permesos, mi certe klopodos, akceli vian celadon al enkonduko de Esperanto en la aliaj liglandaj edukinstitutoj.

Plej bone dankante pro la ĝisnuna tiel neegoista intereso pri la liglandaj edukinstitutoj, mi signas

esprimante estimegon
plej sindone
Scapinelli m. p.

En la venonta numero aperos denove artaj ilustraĵoj.

La venonta internacia kongreso de esperantista laboristaro en Wien.

La eksekutivo de Sennacieca Asocio Tutmonda (S. A. T.) en Paris, la ĉefa proletaria organizaĵo esperantista kun pli ol tri mil membroj en ĉiuj landoj de l' mondo, ĵus decidis en interkonsento kun sia Wien-a reprezentantaro okazigi sian Kvinan mondkongreson komence de aŭgusto en Wien. La antaŭaj kongresoj de tiu laborista asocio okazis je honora prezidanteco de prof-ro Einstein, Henry Barbusse, Romain Rolland kaj E. Toller.

Foiro de Leipzig.

Skribi ties historion signifus verki la ĉefan parton de l' germana kaj gravan ankaŭ de l' eŭropa historio ekonomia. La unuan fojon ĝi dokumente estas menciata en la jaro 1268 kaj malgraŭ ofta interrompo per milito aŭ ekonomia mizero ĝi ekfloris ĉiam denove. Adaptante sin al novaj cirkonstancoj ĝi respegulis ĉiam la kulturan staton de la epoko.

En 1897 nur 1300 ekspozantaj firmoj estis reprezentataj, en 1923/24 jam 15.000, kiuj allogis 175.000 vizitantojn ĉiulandajn.

La venonta printempa foiro 1925 (1. ĝis 7. marto) estos karakterizata per aliĝo de grandioza speciala subfoiro teknika sur aero de 400 000 m². Giganta nova halo por tiu celo estos inaŭgurata.

Ĉiu Esperantisto scias pri la meritoj de la foirdirekcio je la Esperanto-movado. Do varbu por ĝi! Postulu Esperanto-prospektojn kaj afiŝojn ĉe „Messeamt, Leipzig, Markt 4" kaj disvastigu tiujn bonegajn Esperanto-propagandilojn! La redakcio.

Internacia specimena foiro de Lyon

ĵus dissendis siajn invitilojn, bele ilustritajn, por la 2. ĝis 15. marto 1925. La foiro estas ĉiujara, universala, internacia, moderna. La E.-oficejo troviĝas: Lyon, 30 Rue Ferrandière, kie ankaŭ estas la akceptejo por esperantistaj vizitontoj. Al ĉiu esperantista komercisto, kiu deziras ricevi proponojn, katalogojn, prezlistojn pri iu artiklo, la foiro ofertas senpagan anoncon en sia bulteno.

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

A.E.D.-direktantaro priparolis en sia kunsido 27. decembro organizajn aferojn kaj decidis, alvoki la landestrojn kunhelpi en statistika laboro, kunlabori en la raportado al „A. E.", rapide alsendi kotizojn kaj antaŭmeti proponojn pri ŝanĝo kaj kompletigo de la laborregularo de A. E. D.

Instalo de gazetservo. En la ĵus okazinta konferenco de A. E. D. en Graz oni komencis realigi la ĝis nun tre forte sentatan bezonon: konstanta kaj sistema informado de la nacilingva gazetaro pri la progresoj de Esperanto. Por tiu ĉi celo oni konfidis la starigon kaj gvidon de gazetservo al d-ro Emil Pfeffer kun la kooptito prof-ro d-ro Christanell por la eksterwiena teritorio. La gazetara servo en Wien starigis komitaton, kies anoj estas krom la nomitaj ankaŭ la kooptitaj s-roj Čech kaj prof-ro d-ro Jokl (por la ĉeĥa gazetaro). Ĝen. sekretario.

La komercistkursa eksperimento decidita de K. R. en Genève, pentekoston 1924, kies organizanto estas s-ro Edmonds, London, komencos en januaro. Estos aranĝataj en minimume dek diversaj landoj samtempe 25 horaj kursoj por komercistoj, se eble sub kontrolo de grava komerca organizaĵo. Post la fino (en marto) la nesamlandaj partoprenintoj estos interrilatigataj por provi ilian kapablon je komerca korespondado. — Varbu kursanojn en komercistaj rondoj de Wien! Ili anoncu sin skribe al Büro Feller, Wien I, Sonnenfelsgasse 11.

Germanlingvaj gazetpropagandistoj atentu! (Alvoko de „Gazetara Servo de A. E. D.“) La laŭ decido de A. E. D.-konferenco en Graz ĵus instalita gazetservo petas samideanojn en ĉiuj iom grandaj urboj de Aŭstrio kaj tuta germanlingva eksterlando, sendadi al ĝi eltranĉaĵojn el germanlingvaj ĵurnaloj kun esperantaj artikoloj kaj notoj, taŭgaj por represo. Temas tie ĉi same pri poresperantaj varbartikoloj, kiel ankaŭ pri diverstemaj traktaĵoj, tradukitaj el Esperanto germanlingven. Al siaj kunlaborantoj sendados la gazetservo laŭdezire por la loka gazetaro destinitajn kontribuaĵojn. Adreso: D-ro E. Pfeffer, presgvidanto, Wien II/1, Postamt 34.

Grupo St. Pölten aranĝis la 19. decembro Zamenhof-festvesperon, kiu treege kontentigis la multnombrajn alvenintojn. Kolekto por Zamenhof-monumento bone sukcesis.

Internacia konferenco por la uzado de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj rondoj

okazos en Paris, majo 1925. Ĝia celo estos, studi la rimedojn taŭgajn por efektivigo de diversflankaj dezirespimoj pri uzo de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Bonvolu tuj konigi adresojn de scienculoj, teknikistoj, societoj, firmoj, fakgazetoj, eldonejoj gravaj por la afero, menciante ĉu ili jam favoras Esperanton, estu decentre invitotaj aŭ — preferinde! — la invitilo de vi aŭ alia tiea persono transdonota, plue ĉe societoj, kiu reprezentos ilin en Paris. Aliĝo senpaga.

Ne senage restu en tiu grava afero! Eklaboru tuj kaj sendu ĉiujn informojn al Fr. J. Schade, Wien VI, Mollardgasse 55.

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien XXI, Am Spitz 14.

KORAN GRATULON

al niaj du malnovaj pioniroj s-ro kort.-kons. *Ferdinand Hartwich* kaj s-ro d-ro *Edmund Sós*, kiuj ambaŭ antaŭ nelonge festis sian 60jaran naskiĝtagon.

Ni esprimas al ili ĉiokaze nian koregan dankon pro ilia longjara poresperanta laboro kaj bondezirojn por la estonto, nome de la esperantistaro de Wien:

La estraro de E.-Del. Wien.

„Der städtische Angestellte“, Wien (t. e. „La Urba Postenhavanto“) depost mallonga tempo disponigas al la „Esp.-Organizo de ofichavantoj de Urbo Wien“ grandan lokon por artikoloj pri E. Ĝojiga pruvo, ke ankaŭ tie degelas la glacio. Al niaj fervoraj s-anoj laborantaj tie koregan gratulon!

„Junularo“ kunvenas ĵaŭdon 7½ kafejo, III, Radetzkystrasse 23. Prelegoj: la 15. januaro s-ino Hacker, 22. januaro f-ino Zimmer, 29. januaro s-ro Warkány, 5. februaro f-ino Berger, 12. februaro f-ino Placzek. — Aranĝos kurson en lernejo, II, Blumauergasse 21, la 19. februaro je la 7a. Gvidanto Warkány.

„Vesperto“, dramatika rondo Esp. en Wien, intencas fondi unue mandolinan sekcion kaj invitas E-ojn, kiuj scias ludi mandolinon aŭ similajn instrumentojn, anonci sian partoprenon al sekretario Fr. Vasta, Wien XIV, Reindorfgasse 13.

Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista

Centro: Bisamberg n-ro 248 apud Wien.

Elektrigo de Arlbergfervojo.

Kiel konate Arlberg estas 1802 m alta Alptranspasejo ĉe la limo inter Tirol kaj Vorarlberg (t. e. lando antaŭ Arlberg). Ĝi ankaŭ disigas la akvojn fluantajn unuflanken al Rhein, aliflanken al Donau. Jam en la jaro 1824 estis finkonstruata alpstrato trans ĝin de Stanzertal (valo) al Klostertal.

La ekonomia kaŭzo por tiu interkomunikilo estis, krei transporteblon por komercaĵoj el oriento trans Trieste kaj por naturaĵoj el Hungarlando okcidenten krom la sudgermanaj fervojoj.

En 1880 komencis sub gvidado de inĝ. Julius Lott († 1883) la konstruo de 136·6 km longa fervojlinio Innsbruck—Bludenz, kiu povis esti inaŭgurata la 20. septembro 1884.

Estis necese konstrui 10·25 km longan tunelon. La laboroj penigaj kaj danĝeraj daŭris preskaŭ kvar jarojn (ĝis 15. novembro 1883) kaj kostis 19·1 milionojn da guldenoj (1 guldeno valoris tiam 2·1 sv. fr.). Interesa estas tiu ĉi fervojparto ne nur pro la longeco de la tunelo, sed ankaŭ pro la fakto, ke en ĝi troviĝas la maksimuma altiĝo ĝis nun ĉe adherfervojoj atingita (31·4‰).

Ĝia orienta enveturejo situas 1302 m alte, la okcidenta 1215 m, la plej alta punkto 1311 m.

Por la vojaĝado la elektra funkciigo de la trajnoj estas tre grava plibonigo. Oni ja devis ĝis nun eĉ per rapidegtrajno veturi 20 ĝis 25 minutojn tra la tunelo kun fermitaj fenestroj pro la fumo.

La 24. novembro 1924 la unuan fojon la D-trajnoj 309 kaj 310 pasis la tunelon per elektra forto movataj.

H. Steiner, Bisamberg.

Novaj reprezentantoj. S-ro inspektoro Ludwig Frey en Budapest (sudfervojdirekcio) por Hungarlando kaj s-ro Jules Perlet, oficisto de la fervoja departemento en Bern, Postfach trs. 560, por Svislando.

Reprezentantoj! Bonvolu ne prokrasti viajn raportojn! Gekolegoj sendu bonvole fakartikolojn!

Universala Esperantista Pacifista Ligo

Centro: Wien I, Hofburg (Aŭstrio).

Kiel ni praktike solvu la problemon de l' perforto.

Okaze la A. E. D.-konferenco en Graz la tiea grupo de militkontraŭuloj invitis la vicprezidanton de U. E. P. L., s-ron Walter Smital-Wien, paroli dimanĉe 7. decembro 1924 en publika kunveno pri supre nomita temo. Jen konciza raporto pri liaj vortoj.

Bazante sur idedifinoj de doktoro Kobler, Wien,[1]) pri potenco, devigo, perforto kaj rajto, li ilustris la nunan mensostaton de l' socio kaj ties eduko- kaj instruadkaŭzojn.

En la familio kutime la petrigardo de l' patrino reprezentas nekontraŭstareblan sugestan devigrimedon de la eduko, la bastono de la patro perfortan.

En la lernejo la infanoj kreskadas sub la influo de perfortglorado: Konkerintoj estas prezentataj kiel „granduloj de siaj epokoj" k. s.

La ĉiuhoma bestrestaĵo perfortemo tiel ĉiam denove estas nutrata.

En la publika vivo konstanta pliiĝo de organiziteco ebligis kolektivperforton, militon. Kvankam laŭsperte perforto ĉiam efikas nur negative, neniam kreis daŭran bonon, do ne estas taŭga rimedo, ja nuligas sin mem, eĉ mem forigas la perfortintojn,[2]) tamen la „publika opinio" laŭsente konservis la kredon je taŭgeco de la rimedo perforto: „La nuna stato neniam ŝanĝiĝos, la potempaj potenculoj bezonokaze ĉiam uzos perforton." La spertbazo de tiu kredo estas la egala konduto de ĉiuj regintaj politikaj potencoj, ilia sama sistemo: „La plifortulo estas prava."

Tiun eraran publikan opinion ni devos ŝanĝi; modele labori laŭ la devizo „Reciprokan helpon!" anstataŭ „batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj"; per klerecdisvastigado ekkonigi ĝenerale la ko-

[1]) Prezentitaj en diskuto pri la problemo de l' perforto, okazigita de Ligo de Militkontraŭuloj en Wien, 22. novembro 1924.

[2]) Kompreneble la biblian vorton: „Kiu ekprenas glavon, pereos per glavo" kaj la raporton de la speciala komisiono por studo de la efikoj de ĥemia kaj bakteria milito al Ligo de Nacioj, laŭ kiu „la civila loĝantaro ne povas esti ŝirmata kontraŭ la ĥemia batalilo" kaj „ne ekzistas efika metodo de kolektivŝirmo" kontraŭ la „pli ol 1000 jam ekzistantaj venengasoj".

munan celon de ĉiuj normalaj homoj: feliĉiĝi; interligi la diversnaciajn kaj -klasajn homojn (jam infanojn!); malebligi pogrupan fiagitadon kaj similmaniere helpi al fina solvo de l' socia problemo sur internacia bazo.

Por tio ekestis al ni en la lasta tempo du gravaj rimedoj: senfadena disaŭdigo kaj Esperanto.

Celkonscia laborado je ni mem, en familio, lernejo, publika kaj precipe internacia vivo kondukos nin al nia celo sole hominda: pleja feliĉo de ĉiuj — sen perforto. — —

La 2½hora parolado estis akceptata kun ega entuziasmo. S-ro Smital forlasis nin akompanata de nia deziro, ke li parolu baldaŭ denove en Graz antaŭ pli granda aŭskultantaro.

Josef Eder, Graz,
prezidanto de Esperanto-rondo „Homiĝu!"

Aŭstra Pacifista Esp. Societo aranĝos kurson en Oberrealschule, Wien III, Radetzkystrasse 2, 16 februaro, 6a vespere, kaj poste ĉiun lundon. Gvidanto R. M. Frey.

RIMARKINDAJ PRESAĴOJ.

Literatura Mondo. Eldonas: Hungara Esperanto-Instituto, Budapest VI, Eötvös-u. 3.

Aperis la novembra numero de ĉi tiu bonega revuo. Samkvalita, laŭ la interna valoro kiel ĉiuj ĝisnunaj, ĝi malampleksiĝis je unu triono de sia paĝnombro. Kial? Kiu kulpas pro ĉi tio? Ĉu ne nia anaro mem? Ĉu ni estas tiom malmultnombraj, ke nia unika ilustrita beletristikaĵo, tiel eminenta, povas havi nur 300 abonantojn? Ĉu estas kredeble, ke ĝi pro manko de necesega subtenado povus ftiziĝi kaj fine eĉ morti? Tiun ĉi demandon respondu ĉiu unuopa neabonanto al si mem kaj — agu laŭe! *Franz Zwach*, Wien.

Prof. Dr. Franz Christanell: Esperanto, ein moderner Bildungsfaktor (t. e. Esperanto, moderna klerigilo). Esperanto-eldonejo Ellersiek & Borel, G. m. b. H., Berlin-Dresden, 1924.

Ĝustatempe, kiam la enlernejigo de Esperanto ekestas aktuala problemo, prof-ro Christanell koncize prezentas sur 24 paĝoj konvinkigan vicon da ideoj pri tiu temo. Tiu germana teksto ne nur ege taŭgas kiel informilo por skeptikuloj pro la senpasia, sed varmkora traktmaniero de nia klarspirita eminentulo, sed ankaŭ havigos valoran scion pri Esperanto-koncernaj pedagogiaj konsideroj liverante tiel disvastigindan argumentaron. Al propagandistoj mi en la nuna tempo ne povas rekomendi pli taŭgan konvinkilon por instruistoj, gepatraj kaj entute intelektulaj rondoj. *W. Smital*, Wien.

Landestraro de A. E. D. por Salzburg eldonis belan gvidlibron tra Salzburg „por plifaciligi al eksterlandaj gesamideanoj la vizitadon de tiu tre bela kaj interesa landeto kaj por tiel samtempe subteni la disvastigadon de Esperanto tie". La ilustrita libreto informas interalie per kelkaj tre interesaj ĉapitroj pri la historio de urbo Salzburg, alpvidindaĵoj, glacikavernoj kaj similaj.

Ĉiokaze ni ankaŭ menciu la malpli novan gvidlibron tra Graz, sub aŭspicioj de „Landesverband für Fremdenverkehr in Steiermark" (t. e. Landa Asocio por fremdulfrekvento en Stirio) eldonita de Stiria Esperantista Societo Graz kun subvencio de tiu urbo. Ĝi estas ankaŭ ilustrita kaj detale informas en tri zorge laboritaj partoj pri ĉio sciinda.

Tiuj du Esperantaĵoj estas tre imitindaj.

Novaj poŝtmarkoj en Aŭstrio. La 1. decembro la poŝtadministraro eldonis pro plialtigo de la poŝtpago vicon da novaj poŝtmarkoj: Por simpla afranko: 700 K bruna, 800 K violkolora (desegno „grenspiko"), 1500 K oranĝkolora, 4000 K blua sur blua papero (desegno „martelo kaj prenilo"); por posta afranko: 1500 kaj 3000 K violkolora (desegno kiel la nunaj); poŝtkartoj: 700 K bruna. Oni ne intencas eldoni jam nun poŝtmarkojn laŭ ŝilinga monsistemo, sed fari surpresojn je la nunaj poŝtmarkoj.

ANONCOJ 3liniaj anonc. 7000 aŭ. K. Reklamo ¼ pĝ. = 250 mil., ½ = 130 mil., ¼ = 70 mil., ⅛ = 40 mil. aŭ. K; je 3foja enpreso 5% rabato.

Karaj samideanoj tutmondaj!

Subtenu mian kolektadon de Esperantaĵoj per alsendo de unuopaj E.-gazetoj ĉiulandaj. Mi dankos per tuja alsendo de nia landa gazeto aŭ ilustrita poŝtkarto.

Bernhard Selzer, Wien X, Ettenreichgasse 4|31.

»CAECILIA«

Österreichische Orgelbau A.G.

Fabrikado de
preĝej- kaj salonorgenoj, pianoj
harmoniumoj kaj
violonoj

Fabrikejoj:

Salzburg-Parsch, Gaisbergstrasse
Nr. 13a

Telegramadreso: Cäciliag Salzburg
Telefono: 302, Salzburg

Artistaj ĉefoj:

Akademiprofesoro V. Goller, Klosterneuburg, kaj katedralmuzikestro
Franz X. Gruber, Salzburg

La teknika gvidado estas en la manoj
de famaj fakuloj

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gstaltner & Co., G. m. b. H., Korneuburg, Kirchengasse 3.